he! hej! hola! (<i>se usan para llamar a alguien</i>)	nu! ¡pues bien! ¡y cómo! (<i>interjección indefinida</i>)
ho! ¡oh! (<i>¡qué admiración!</i>)	ve! ¡ay! (<i>¡qué dolor!</i>)
	ek'! ¡a empezar!

Muchas palabras pueden usarse como interjecciones, por ejemplo:

adiaŭ! ¡adiós!	kompatu! tenga compasión
akven! ¡al agua!	la Ĉielo volu! ¡quiera el Cielo!
al la diablo! ¡al diablo!	malantaŭen! ¡atrás!
antaŭen! ¡adelante!	malbenon! ¡maldición!
atentu! ¡atención!	malsupren! ¡abajo!
bonan tagon! buenos días	mi petas! ¡haga el favor!
bonvolu! ¡haga el favor!	mi salutas vin! se le saluda
danke! agradecido	mortu! ¡muera!
dankon! gracias	pafu! ¡fuego! (<i>disparar</i>)
dekstren! ¡a la derecha!	returnen! ¡atrás!
Dio volu! ¡ojalá!	ripozu pace! R. I. P.
domaĝe! ¡lástima!	salutojn! ¡saludos!
fajro! ¡fuego! (<i>incendio</i>)	saluton! se le saluda
fartu bone! Vd. siga bien	sensencaĵo! ¡tontería!
flanken! ¡despejen!	supren! ¡arriba!
for! ¡abajo! ¡fuera!	vigle! ¡alerta!
haltu! halt'! ¡alto!	vivu! ¡viva
helpu! ¡socorro!	zorgu! ¡cuidado!

METODA EKZERCARO

Ekzerco de legado:

Abelo, al, abdiki, al oni, abio, barelo, cipreso, paco, cedi, ĉapelo, ĉerizo, eĉ, daktilo, domo, elefanto, fama, guto, gitaro, ĝui, aĝo, homo, hore, iam, jam, ĉevaloj, librojn, ĵeti, ĵus, kaj, lonicerio, mondo, nun, objekto, pomo, ruĝa, rigardi, rostro, estas, salono, selo, ŝelo, tono, tra, unu, aŭdi, veti, zume.

Por presi aŭ telegrafi, kiam oni ne posedas la supersignitajn literojn, oni povas skribi: chapelo, cherizo, ech, ghui, agho, hhore, chevaloj, jheti, rugha, shelo, audi.

1 kaj 2 (Artikolo kaj substantivo)

La pordo. La knabo. La knabino. La pordon. La knaboj. La knabinoj. La geknabojn. La pordoj de la ĉambro. Donaco al la filoj. Donaco de la amiko. Lakto sen kremo. Pano kun butero. Manteloj por virinoj. La patrino amas la filinon. La profesoroj amas la infanojn. Ĉu la patrino amas la filinon? — Jes. Ĉu la profesoroj malamas la infanojn? — Ne.

3 (Adjektivo)

Granda tablo. La grandaj fenestroj. La patro amas la bonan filon. Filo bona. La patrinoj amas la bonajn filinojn. La filinoj estas bonaj. La amikoj estas pli leŝtaj, ol la najbarinoj. La plej vigla el la fratoj estas Johano. La fratino estas tiel alta, kiel la frato.

4 (Numeraloj)

Unu kaj du estas tri. Du kaj kvar faras ses. Jozefo donas al Johano unu pomon kaj tri pirojn. La tria pordo estas la plej granda. La oka horo. La unua tago de Februaro estas la tridek-dua tago de la jaro. Tago estas sepono de semajno (aŭ da semajno). La fluidaĵo enhavas dekonon de gramo da sulfuro. Petro manĝis la duonon de la pano. La frato havas sep oranĝojn. Dek unuoj faras dekon. Duone ok estas kvar. Duoble kvar estas ok. La infano havas kvar jarojn. La patro esta kvardekjara. La frato havas duonan melonon (aŭ duonon da melono). Alberto havas duoblan porcion. La soldatoj marŝas kvarope. La patrino donas po du pomoj al la tri infanoj. Dek signoj de poŝto (aŭ poŝtmarkoj) de po kvin centimoj.

5 (Pronomoj)

Mi havas du librojn. Mi havas ilin. Mi kaj vi estas ni. Li, ŝi kaj ĝi estas ili. Li amas ŝin. Ili ne amas lin. Li donas al li monon. Ni aŭdas nin. Li ne aŭdas sin mem. Li ne amas sian propran filon. Vi estas infanoj. Ili estas grandaj. Iu havas ĝin. Kiu havas ĝin? Li donas al ni la monon, kiun li havas. Kiu estas bona, tiu amas sian patron. Tiu, kiu estas bona, amas sian patron. (La) infano, kiu estas bona, amas sian patrinon. Kion vi havas? Tio estas bela. Mi havas nenion. Mi ne havas ion. Ne ĉio estas bona. Ne ĉiuj, kiuj havas monon, estas feliĉaj. Ŝi havas tion, kio estas utila. Li donas al vi ĉion, kio estas lia. Tio estas ĉio, kion li havas. Kio estas tio? — (Tio estas) fenestro. Kiu estas mi? — (Vi estas) Petro. Kio estas li? — (Li estas) doktoro. Kiaj estas ili? — (Ili estas) afablaj.

6 (Verbo kaj Participo)

Hodiaŭ li estas laca. Hieraŭ li estis afabla. Morgaŭ li estos saĝa. Ni donus al li panon, se ni povus. Donu al ni la krajonojn. Ni skribu leteron. Iru ni. Ili estas skribantaj leteron. Mi estis manĝanta pomon. La letero estas skribata de ili. La pomo estis manĝata de mi. Iru for! Venu baldaŭ. Parolante pri pomo, kiun infano manĝis hieraŭ je la deka horo, ni povas diri: Hieraŭ, je la naŭa horo la infano estis manĝanta la pomon, kaj la pomo estis manĝota de la infano; je la deka horo la infano estis manĝanta la pomon, kaj la pomo estis manĝata de la infano; je la dek-unua la infano estis manĝinta la pomon, kaj la pomo estis manĝita de la infano. Parolante pri pomo, kiun infano manĝos morgaŭ je la deka horo, ni povas diri: Morgaŭ, je la naŭa horo la infano estos manĝanta la pomon. je la deka la infano estos manĝanta la pomon; je la dek unua la infano estos manĝinta la pomon, kaj, metante la frazon en pasivan formon; Morgaŭ je la naŭa la pomo estos manĝota de la infano; je la deka la pomo estos manĝata, kaj je la dek unua ĝi estos manĝita. Nun, supozante en la estanta momento ĉiun el la tri diritaj horoj, kaj supozante ĉiam en la deka horo la agon manĝi, oni povas diri: Nun, je la naŭa horo la infano estas manĝanta la pomon, do, la pomo estas manĝota de la infano; nun, je la deka horo la infano estas manĝanta la pomon, sekve la pomo estas manĝata de la infa-

uo, kaj nun, je la dek unua horo la infano estas manĝinta la pomon, kaj la pomo, estas manĝita de li.

7 (Adverbo)

La ĉevalo saltas bone La infano parolas afable. Komuniku tion skribe. Li lernis la lecionon parkere. Legante li ekdormis. Elegante ŝi sin vestas. Konsideru la aferon zorge. Ni traktis amike la knabon. Li kantis pli bone, ol ŝi. Ŝi deklamis la plej bele el ili. Instruante oni lernas funde. La viro kantis tiel agrable, kiel la virino. Kiam la avino aŭdis tion, (tiam) ŝi ekploris. Kiom da vino vi trinkis? Tiom da suferoj nuligis al ŝi la saĝ(ec)on. Kie oni dancas, tie estas gaje. Kial li vekiĝis? — Tial, ke oni brue muzikis. La homo ĉial devas honeste agi. Oni ĉiam devas plenumi siajn promesojn. Malmulte parolu kaj multe agu.

8 (Prepozicio)

Infanoj, venu al mi. Antaŭ la ĉefo staris la komizo. Li petis du kilogramojn da pano. Donu al mi tri poŝtmarkojn de po dek centimoj. Vendu al tiu homo la sukeron, kiun vi aĉetis hieraŭ de la komercisto. Mi aĉetis al (aŭ por) mia filo bombonojn. Veni de tie. Ŝi aĉetis de la knabo pomojn. La libro estis aĉetita de mi. La varbado je (aŭ pri) adeptoj fare de la propagandistoj. Dum naŭ tagoj li legis la libron. En mia hejmo troviĝas multaj mebloj. Ekster la domo estas pli malvarme, ol interne. Oni pelis lin for de (aŭ el) la domo. La filo sidis inter la patro kaj la patrino. Interne de la koro li sentis malvarmon. Ili batalis kun la amikoj kontraŭ la malamikoj. La palaco, kiu troviĝas kontraŭ nia loĝejo, estas granda kaj bela. Li promenis kun sia amikino. Per plugilo li (pri)laboris la kampon (aŭ li laboris sur la kampo). La blua krajono estas por la knabo rekompencita de la juĝantaro. Sur la konstruaĵo staras longa kamentubo, kaj super ĝi flugas cikonio. Sen aero oni ne povas vivi. La ĉevalo galopis tra la ŝoseo. Ĝi trotis tra la ŝoseo.

Apud la arbo estas fonto. (Donu al li panon anstataŭ akvon). Ambaŭ loĝas ĉe mi. Ĉe lia minaco ili forflugis. Ĉiuj sidis ĉe la tablo. Tio estis moro ĉe la grekoj. La pigmeoj rondodancis ĉirkaŭ la du amikoj. Li ricevis ĉirkaŭ (adverbo) tridek monerojn (Li ricevis proksimume tridek monerojn.) Dank' al Dio ni fartas bone. Eliru el la kuirejo.

La hundo kuris ĝis tiu muro. Krom bonecon li posedis nenion. Al li restis neniŭ frato plu, krom Petro. Krom Johanon li havis ankaŭ aliajn fratojn. Laŭ la kuracisto li baldaŭ resaniĝos. Malgraŭ la konsiloj de sia patro li agis malbone. Ni vidis la kaptiton post la krado. Post la leciono li faris paroladon. Ŝi pasis preter la domo de sia amikino. La instruisto parolas nun pri fiziko. Pro la forta vento la folioj defaladis de la arbo. La tero estis kaŝita sub dika tavolo el neĝo. La ĉevalo staras trans la rivero. La birdo flugas trans la riveron. La infano kuris trans la strato. La infano kuris trans la straton. La infano kuris tra la strato. Li levis sin je la oka horo matene. Estas tre kruele ridi je blindulo. La reĝido edziĝis je la bela knabino.

Pri la akuzativo post **anstataŭ, krom, ekster, ĉirkaŭ**, kaj aliaj "prepozicioj" uzataj kiel konjunkcioj aŭ adverboj, vidu notojn sub n.º 19. Listo de prepozicioj.

Dro. Zamenhof ne uzas la akuzativon post *anstataŭ*, sed aprobas ĝian uzon por doni klarecon al la frazo. (Lingvaj Respondoj).

REGULOJ

9 (La Ekzercio de legado transskribita en hispana ortografio kaj kun disigitaj silaboj).

a-be-lo, al, ab-di-qui, a-bo-ni, a-bi-o, ba-re-lo, tsi-pre-so, pa-tso, tse-di, cha-pe-lo, che-ri-zo, ech, dac-ti-lo, do-mo, e-le-fan-to, fa-ma, gu-to, gui-ta-ro, dju-i, a-djo, ĵo-mo, jo-re, i-am, yam, che-va-loy, li-broyn, je-ti, jus, kay, lo-ni-tse-ro, mon-do, nun, ob-yec-to, po-mo, ru.dja, ri-gar-di, ros-tro, es-tas, sa-lo-no, se.lo, che.lo, to.no, tra, u-nu, au-di, ve-ti, zu-me. (Por la dikaj literoj, vidu Alfabeton, sur paĝo 17.)

10. (La ekzercio 1 kaj 2 en hispana ortografio kaj kun montrado de la akcento.)

La pórdo. La cnábo. La cnabíno. La pórdon. La cnáboy. La cnabínoy. La guecnáboy. La pórdoy de la chámbró. Donátso al la filóy. Donátso de la amíco. Lácto sen crémo. Páno cun butéro. Mantéloy por virínoy. La patríno ámas la filínó. La profesóroy ámas la infá-

noyn. Chu la patrino ámas la filinon?—Yes. Chu la profesoroj malámas la infanojn?—Ne.

11. (*Kunmetitaj vortoj*)

Facilmova. Laktokruĉo. Alimaniere. Vaporŝipo. Submarboato. Lernolibro. Farunbarelo. Kudromaŝino. Vivipova. Adreslibro. Vizitkarto. Parolmaniero. Kongreslibro. Dubeblua. Lignoŝuo. Brulligno. Petskribo. Murhorloĝo. Unuavide. Duataga. Dutaga. Velŝipo. Ŝipvelo. Skribmaŝino. Maŝinskribo. Poŝtkarto. Posttagmezo. Kursfino. Nutrajvendejo. Dramverkisto. Metiolernanto. Blindullernejo. Majstroverko. Liberkreda. Ĝojkrii. Deziresprimo. Internacilingva. Tuteŭropa. Ĉeĥoslovaka. Saflano. Teksfabriko. Teatramanto. Mieldolĉe. Marveturi. Flugmaŝine. Libertempa. Somerrestadejo. Sargveturilo. Glitŝuo. Libroŝranko. Legomĝardeno. Vinbero. Pomvino. Kontraŭvola. Duetaĝa. Tertremo. Okulvitroj. Lipharoj. Senbarba. Multeflanka. Verdastelulo. Neĝblanka. Ĉiopova. Diverskolora.

12. (*Neaj frazoj*)

La knabo diris nenion. La knabo ne diris ion. Morgaŭ venos neniu. Morgaŭ ne venos iu. Neniam veturos ni tien. Ni ne veturos iam tien. Mi neniel povus imagi ĝin. Mi ne povus imagi ĝin iel. Punu neniun el la infanoj. Ne punu iun el la infanoj. La hundo manĝis neniom da pano. Li povos iri nenien. Li ne povos iri ien. La juĝisto nenial agos tiel. La juĝisto ne agos ial tiel.

13. (*Akuzativo de almovo*)

La lernantoj ne volis reiri hejmen. Ĉe la vojkruciĝo ĉiuj disiris: unuj sin direktis dekstren kaj aliaj maldekstren. En la mondon venis nova sento. La proksiman semajnon ni veturos Barcelonon. Tien, kie ŝi estas li vojaĝos. La knabo ne diris al la policianoj, kien la ŝtelisto forkuris; tial ili ne povis ekscii, kien li sin direktis. Noktiĝis, kiam ni eniris en la urbon. Ni iris al la urbo. Ni iris ĝis la urbo.

14. (*Difinita kaj konstanta signifo de la prepozicioj*)
(*Komuna prepozicio je*)

La ĉevalo estas en la stalo. Li rajdas sur ĉevalo. Ŝi rajdas sur azeno. Ili rajdas sur bicikloj. La infano sidas sur benko en la ĝar-

deno. Ili sidis ĉe la tablo. La verkisto parolas pri siaj lastaj verkoj. Dispecigu la panon per tranĉilo. La najbaro promenis kun sia fianĉino. Pro lia kulpo li estis kondamnita. Mi venas de la domo. Mi eliros el la domo. Glaso de vino. Glaso da vino. Glaso el vitro. Plumo por skribi. Je la naŭa matene. Je la sepa de Oktobro. La najbaro edziĝis je ŝi. (*Vidu ankaŭ Ekzercon 8*).

15. *Vortoj fremdaj (aŭ internaciaj)*

Geografio. Geografia. Geografie. Matematika. Teatro. Talento. Enigme. Vertebra. Elefanto. Magio. Telegrafo. Telefono. Aŭtomobilo. Kinematografo. Stenografia. Acroplanc. Filozofo. Astronomo. Bojko. ti. Meĥaniko. Akustika. Pneŭmatika. Optiko. Poŝta. Universala. Enerĝie. Diplomatio. Advokato. Universitato. Instituto. Seminario. Gimnastika.

16. (*Forlaso de la fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo*).

(Ĝi estas uzata preskaŭ nur en la versoj).

Al la mond' eterne militanta. Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera. El ĉiel' al la ter'. Dua Libro de l' lingvo Internacia. "La Batalo de l'vivo" estas rakonto de la fama angla verkisto Dickens (elparolu Dikens), tradukita de D-ro Zamenhof.

Afiksoj kaj rilataj terminoj

17. a kaj 17 b. (*Afiksoj*)

La **hopatro** amis multe la **hofilon**. Pro troa vaporpremo la kaldronego povas **diskrevi**. Subite li **ektusis**. La bibliotekisto **eksiĝis**, do nun li estas **eksbibliotekisto**. La **gefianĉoj** iros al la preĝejo por la **geedziĝa** ceremonio. La **mallerta** generalo kondukis sian armeon al **malvenko**. Regalu lin **malavare**. Ne faru donacojn al la **malobeema** nevo. Niaj **praavoj** ne konis tiun landon. La soldato remetis la glavon en ĝian **ingon**. Eble tie li povos **tranokti** en gastejo. **Forjetu** la **malpuran** ĉapelaĉon. Aĵo **neutila** estas preferinda, ol aĵo **malutila**. La lernado de Esperanto fariĝis **agrablega** por la lernemaj knabinoj. Blankigu la muron per kalko. La beleco estas **eco ŝatinda**. La **hopatrino** tranĉis la kokidon per akra tranĉilo. El kesteto ŝi **eltiris** arĝentumitan manĝilaron. Rusujo estas la plej

vasta lando el Eŭropo. La instruistino donacis al la studema infano plumingon kaj inkujon.

18. (*Simplaj vortoj aŭ korelativoj*)

Li **ĉiam** trinkas **tian** kafon. **Ĉi tien** neniu venas **iam**. **Tiu, kiu** ĵus foriris eble **neniam** revenos. **Tiu** infano serĉis sian patrinon, kaj trovis **ŝin tie**. Konduku **ĝin tien**. **Kiom** da libroj! Li estas **tiel** bela, **kiel** ŝi. **Ĉiu** virino trinkis **iom** da biero. **Ĉiuj** homoj, **kiujn** ni renkontis, estis **tiel** afablaj, ke ni volis longe resti **tie**. La **ĉi tieaj** gazetoj estas **ĉiumonataj**. Mi ne scias, **kial** li faris **tion**. (*Vidu ankaŭ Ekzercojn 5, 7 kaj 12.*)

18 A. (*Adverboj*)

Se li venus **baldaŭ**, mi **ĝojus**. **Apenaŭ** la patrino **ŝin** vidis, **ŝi** parolis al **ŝi**. Ili havas talenton, sed ili posedas **ankaŭ** monon. **Hieraŭ** ni kantis, **hodiaŭ** ni kantas kaj **morgaŭ** **kredeble** ni kantos. **Kiam** ni alvenis, la amiko **ankoraŭ** legis. Ŝajnas, ke la najbaro faris tion **intence**. Ne; estas **videble**, ke li agis **senintence**. **Reciproke** ili sin helpis. La paŝtisto sin defendis **kuraĝe** kontraŭ la lupoj. **Ĉiujn** aferojn oni devas **atente** kaj **ĝustatempe** studi. **Nun** iru **dekstren!** Geedzoj devas **pace** vivadi. Tiu dolorego ne estas **daŭre** eltenebla. Li estas **ĉiam** **ankoraŭ** fervora teatramanto. La paŝtisto sin levis **frumatene** kaj iris **malproksimen** (por) paŝti la ŝafaron. **Kiam** estas **malvarme**, oni sentas sin tre **komforte** **hejme** (aŭ **en la hejmo**). La eltrovo de Ameriko okazis **antaŭ** **longe**. Veturu **tuj** al la valo, kaj **tie** **malsupre** vi trovos fonton. Iru **supren** **ĝis** la pinto de tiu monto. Li sekvis **volonte** la konsilon de siaj gepatroj. (*Vidu ankaŭ la Ekzercojn 7 kaj 18.*)

19. (*Prepozicioj*)

Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon, sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion **je**, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio **je** oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio. (**Regulo 14a de la Fundamento Gramatiko**). (*Vidu la Ekzercojn 8 kaj 14.*)

20. (Konjunkcioj)

Kiel prepozicio taŭgas por montri rilaton inter vortoj, tiel konjunkcio servas por montri rilaton inter frazoj, ekzemple, se ni diras: *La patro promenas kun la frato aŭ Ni devas manĝi por vivi*, la vortoj *kun kaj por* estas prepozicioj, ĉar, ekzistante en ĉiu okazo nur unu verbo (en neinfinitiva modo), troviĝas nur unu sola frazo. Kontraŭe, kiam ni diras: *La patro kaj la frato promenas aŭ. Ni devas manĝi, por ke ili estu kontentaj*, la vortoj *kaj kaj por ke* estas konjunkcioj, tial ke en ĉiu el ambaŭ okazoj ekzistas du frazoj (aŭ gramatikaj propozicioj). En la unua el la diritaj okazoj oni povus diri: *La patro (promenas) kaj la frato promenas*. Jen vi vidas, ke ekzistas du neinfinitivaj verboj, el kiuj la unuan ni kutimas forlasi.

(Vidu la Ekzercojn sub leciono Núm. 20 (LISTO DE KONJUNKCIOJ)).

21. (Interjekcioj)

Fi, kiel abomene! Nu, eksidu kaj rakontu. Nu bone, mi akceptos ĝin. Nu do, ke li venu tuj! Ve, kia malfeliĉo! Ve al vi, se vi ofendus la reĝon! Hura! ekkriis la amikoj de la venkinta ludantaro. Ha, se nur mi povus atingi mian celon! He, amiko, venu tien ĉi! Ha, kiel bele! For de tie ĉi! Vivu Esperanto! Antaŭen, kamaradoj! la venko estas nia. Domaĝe, ke li perdis la kuraĝon! Helpon! kriis la loĝantoj de la brulanta domo. La dronanto nur havis la tempon ekkrii: savu! Al la diablo kun viaj tedaj konsiloj! diris la diboĉema junulo. Ek', al la laboro! For la milito! Dankon! diris la savito. Nenial! respondis la modesta savinto. Kuraĝon! kriis la kaporalo al la soldatoj.

LA VEST(AJ)OJ

La vestoj taŭgas por ŝirmi la homan korpon kontraŭ la varmo aŭ malvarmo. Por fari ilin oni uzas diversajn materialojn, kiel ekzemple, lanon, kotonon, linon, silkon, felojn, ledon, kaŭĉukon, k. t. p. La tajloro faras la virajn vestojn. La kudristino faras la virinajn vestojn. La peltisto preparas la felojn por la vestaĵoj. La tanisto preparas la felojn kaj faras el ili ledojn. La vestaĵoj por la diversaj partoj de la korpo ricevas malsamajn nomojn. Ekzistas kapvestoj nomataj ĉapelo, ĉapo, kufo, kepo, turbano, k. a. (kaj aliaj). Por ŝirmi la piedojn troviĝas la piedvestoj nomataj botoj, ŝuoj, sandaloj, pantofloj, galoŝoj, k. t. p. La metiisto, kiu faras ilin estas nomata ŝuisto aŭ botisto. En la varmaj landoj oni uzas ŝuojn faratajn el plektitaj ŝnuretoj kaj el kotontolo, kiujn oni nomas kanabŝuoj au kanabaj piedvestoj ĉar oni antaŭ(temp)e faris ilin el kanabo. Nun oni fabrikas ilin el juto, aŭ hinda kanabo.

Por refreŝigi al si la vizaĝon ĉe granda varmo, troviĝas la ventumiloj. Por eviti la troan varmecon de la suna lumo, estas la sunombreloj. Kun la celo ŝirmi sin kaj siajn vestojn kontraŭ la malsekigo kaŭze de la pluvo, oni elpensis la pluvombrelojn, pluvmantelojn kaj kaŭĉukajn surtutojn, dum la galoŝoj, kiuj povas esti lignaj aŭ kaŭĉukaj, taŭgas por eviti, ke la malsekeco malutilu niajn piedojn kaj ŝuojn.

Malgraŭ la utilo alportata al ni de la vestoj, oni konstatis, ke ili malfortigas nian haŭton kaj sekve nian korpon. do estas necese, almenaŭ de tempo al tempo, liberigi sin de la vestaĵoj dum kelkaj horoj por ke, en deca kontakto kun la taglumo, la freŝa aero kaj la akvo, nia korpo povu refreŝiĝi kaj akiri pli da energio kaj da sano.

Ekzistas krome aliaj objektoj, kiujn oni alkalkulas al la vestaro, ĉar ili estas portataj de la homo, ĉu en la poŝoj, ĉu sur sia korpo, kiel leterujoj, tabakujoj, ringoj, kolringoj, okulvitroj, poŝhorloĝoj, bracelethorloĝoj, k. a. Specialan veston de iu popolo aŭ por iu okazo oni nomas kostumo: nacia, etiketa, kostumo, bankostumo.

Oni uzas la verbojn **(sur)porti** aŭ **(sur)havi** por diri, ke oni estas vestita per tia aŭ tia vestaĵo, kaj oni diras **surmeti** por montri, ke oni devas vesti sin per io. ekzemple: **La knabino portis bluan mantelon. Li surhavis tubforman ĉapelon. Helpu al li surmeti la botojn.** Por montri, ke oni devas senvestigi sin de io, estas uzata la verbo **demeti**: **Enirante en la preĝejon, la viroj demetis siajn kapvestojn.**

Demandoj kaj respondoj pri diversaj partoj de la homa korpo

Kion kovras la ĉapelo? — La kapon. Kion vestas la korsaĵo? — La bruston. Per kio estas ŝirmataj la piedoj? — Per la ŝuoj. Kaj la manoj? — Per la gantoj. Kiu parto de la vesto kovras la brakojn? — La manikoj. Per kio oni helpas al si la okulojn? — Per la okulvitroj (*gafas*) aŭ nazumo (*lentes*). Per kio sin tenas la okulvitroj antaŭ la okuloj? — Per la nazo kaj la oreloj. Kaj la nazumo? — Sole per la nazo. Kion kovras la pantalono? — La femurojn kaj krurojn. Kiel estas nomataj la ostoj de la kruro? — Tibio kaj peroneo. Kiel oni nomas la malantaŭan, molan parton de la kruro? — Tibikarno. Kiun nomon oni donas al la osto de la femuro? — Femurosto. Kion kovras la veŝto? — La bruston. Kion ni havas en la brusto? — La pulmojn kaj la koron, kaj sub ili troviĝas la stomako kaj la intestoj. Kie troviĝas tiuj ĉi lastaj? — En la ventro. Kion ni havas en la kapo? — La cerbon. Kiel oni nomas la antaŭan parton de la kapo? — Vizago.

Kion tenas per la buŝo la viro sur nia bildo? — Pipon. Por kio utilas la pipo? — Por fumi. Kion oni fumas? — Tabakon. Kio estas kovrata de lia manumo? — La manradiko.


Kio kovras la maldekstran kruron de la virino montrata de la bildo? — Blanka ŝtrumpo.

Ĉirkaŭ kion oni metas la zonan? — Ĉirkaŭ la talion; ĉirkaŭ kio estas portata la kolumo? — Ĉirkaŭ la kolo.


Kion enhavas la cigaredujo? — Cigaredojn. Kaj la alumetujo? — Alumetojn. Per kio oni prenas alumeton el alumetujo? — Per la pintoj de la fingroj. Kio elkreskas sur la fingropintoj? — La ungoj.

Kiel estas nomata la malantaŭa parto de la brusto? — Dorsio. Kaj la supra posta ekstremo de la kapo? — Verto. Kiel oni nomas la artik(hav)an internan ostkolonon, kiu tenas niajn bruston kaj kapon? — Vertebraro, ĉar ĝi konsistas el ostoj nomataj vertebroj.

Multon ni povus aldoni pri la homaj korpopartoj kaj ties vestaĵoj, sed ni preferas lasi al la instruisto kaj lernantoj la taskon daŭrigi la ekzercon tiom, kiom ili volas, (aŭ tiel longe, kiel ili volos).



- | | | |
|--------------------|---------------------------|--|
| 1. ĉapelo | 22. zono | 43. monujo |
| 2. okulvitroj | 23. jupo | 44. paperujo, leterujo, biletu-
jo. |
| 3. kolumo | 24. ŝtrumpoj | 45. (poŝ)horloĝo |
| 4. kravato | 25. ventumilo | 46. galoŝo |
| 5. ĉemizo | 26. (sun)ombrelo | 47. mantelo |
| 6. veŝto | 27. orelingoj | 48. ĉapo |
| 7. manumo | 28. braceleto, ĉirkaŭmano | 49. sandalo |
| 8. jako | 29. dekoltaĵo. | 50. raz(tranĉ)ilo |
| 9. butono | 30. broĉo | 51. razpeniko |
| 10. surtuto, palto | 31. kolringo | 52. sapujo |
| 11. maniko | 32. kalsono | 53. ĉubutono |
| 12. pantalono | 33. kamizolo | 54. butontruo |
| 13. ŝuoj | 34. ŝelko | 55. cigaredujo, tabakujo |
| 14. plandumo | 35. ŝtrumptenilo | 56. cigaredoj |
| 15. kalkanumo | 36. kolumfaldaĵo | 57. poŝbruligilo, fajrilo |
| 16. gamaŝo | 37. ŝtrumpetoj | 58. sekurpinglo, pinglo |
| 17. poŝo | 38. pantoflo | 59. alumetujo |
| 18. gantoj | 39. boto | 60. fontoplumo, inkujplumo |
| 19. bastono | 40. pipo | |
| 20. ringo | 41. korseto | |
| 21. korsaĵo | 42. poŝtuko, naztuko | |



- | | | | |
|-----|---------------|-----|---------------------|
| 1. | la avo | 28. | kameno |
| 2. | la avino | 29. | piano |
| 3. | la patro | 30. | tabureto, benketo |
| 4. | la patrino | 31. | portreto |
| 5. | la filo | 32. | skulptaĵo, statueto |
| 6. | la filino | 33. | penetraĵo, pejzaĝo |
| 7. | muro | 34. | kadro |
| 8. | kornico | 35. | pilko |
| 9. | plafono | 36. | muziklibro |
| 10. | planko | 37. | trikaĵo, ŝtrumpo |
| 11. | kahelo | 38. | trikilo |
| 12. | angulo | 39. | fadenbulo |
| 13. | kurteno | 40. | fadeno |
| 14. | stango | 41. | tolaĵo |
| 15. | fosto, kadro | 42. | libroŝranko |
| 16. | sojlo | 43. | radioricevilo |
| 17. | balkono | 44. | seĝa, tabla, piedo |
| 18. | balustrado | 45. | seĝa brako |
| 19. | florpoto | 46. | lumsirmila franĝo |
| 20. | tablo | 47. | lumsirmilo |
| 21. | inkujo | 48. | fajro |
| 22. | seĝo | 49. | brulligno |
| 23. | apogseĝo | 50. | libroj |
| 24. | tapiŝo | 51. | balustrada koloneto |
| 25. | lampo | 52. | soklo |
| 26. | lustro, lampo | 53. | ĵurnalo |
| 27. | kandelingo | | |

Kion faras la avo?—Li legas la ĵurnalon. Kion li legas?—ĵurnalon.


Kion faras la avino? — Ŝi trikas ŝtrumpojn. Kion ŝi trikas? — ŝtrumpojn. Kin legas ĵurnalon? — La avo. Kin trikas ŝtrumpojn? — La avino. Ĉu la avo legas ĵurnalon? — Jes. Ĉu la avo trikas ŝtrumpojn? — Ne. Kin sidas sur la apogseĝoj? — La geavoj. Kiel legas la avo la ĵurnalon? — Atente.

Kiu skribas leteron? — La patro. Kiel estas nomata la patro? — Johano. Al kin skribas la leteron sinjoro Johano? — Al amiko. Por kin li skribas la leteron? — Por amiko. Kion skribas la patro? — Leteron. Kion faras la patro? — Li skribas leteron. Ĉu li skribas leteron? — Jes. Kion li skribas? — Leteron.

Ĉu le gepatroj staras? — Ne, ili sidas. Sur kio? — Sur seĝoj. Ĉu la patrino skribas? — Ne. Do kion ŝi faras? — Ŝi kudras. Kion ŝi kudras? — Tolaĵon. Ĉu la patrino kudras tolaĵon? — Jes. Ĉu la tablo estas ronda? — Ne. Do kia ĝi estas? — Kvadrata aŭ ortangula (*rectangular*).

LA FAMILIO. — LA ĈAMBRO.

La bildo montras ĉambron kun diversaj personoj de la familio. La avo kaj la avino sidas sur brakseĝoj. La unua tenas en siaj manoj ĵurnalon, kiun, tra siaj okulvitroj, li legas atente, dum la avino tenas ŝtrumpon, kiun ŝi diligente trikas. Ambaŭ apogas la brakojn sur la brakapogilo de la seĝo, kaj la dorson sur la dorsapogilo. La kapo de la avino estas kovrita de blankaj haroj kaj tiu de la avo estas senhara. La avo tenas siajn piedojn proksime de la kameno. La apogseĝoj estas tegitaj per blanka ŝtofo. Ĉe kvadrata tablo sidas la patro. Li havas antaŭ si folion el blanka papero, kaj en la dekstra mano li tenas skribilon, ĉar li volas skribi leteron al amiko. La maldekstran kubuton li apogas sur la tabla rando. Li havas nigrajn (kap)harojn kaj lipharojn. Ĉe la alia flanko de la sama tablo la patrino sidas sur seĝo el kurbigita ligno. Ŝi surhavas mallongan robon el florumita katuno, kies detranĉitaj manikoj lasas vidi la blancon de ŝiaj brakoj. Siajn graciajn krurojn kovras blankaj ŝtrumpoj, kaj ŝi havas la piedojn vestitaj per etaj ŝuoj kun alta kalkanumo laŭmoda. La nelongajn harojn ŝi knabomaniere kombis. Inter la tablo kaj la piano, sur la tapiŝo, staras la filo, knabeto ĉirkaŭ sesjara, tenante en la manoj pilkon, ĉar li venas de ludado en la korto. Antaŭ la piano, sur ronda benketo sidas la filino, ludante muzikstudon. Funde en la dekstra angulo estas libroŝranko, kies libroj staras iom kline sur la bretoj. Sur la kameno staras skulptita figuro en teniĝo de ekzot(ik)a danco. En la kamena fajrujo vidiĝas du brulantaj lignopecoj en flamoj. Apud la kameno troviĝas ronda tableto subtenanta radioaparaton, kies funkciadon oni ĵus ĉesigis por havigi al la knabino okazon ludi sian pianostudon. La balkonkurteno, falde apartigita flanken, lasas vidi florpoton, kiu staras sur la balustrado. La tuto montras al ni plaĉan scenon de feliĉa familio, kiu trankvile vivas okupata je siaj preferataj hejmaj aferoj.



LA DOMO

Domo estas konstruaĵo, kie homoj loĝas, kvankam oni ankaŭ uzas la substantivon **domo** en la senco de **hejmo**. Domo konsistas el tri ĉefaj partoj, nome: fundamento, muroj kaj tegmento. La fundamento estas subtera masonaĵo aŭ ŝtonaĵo, sur kiu sin apogas la muroj subtenantaj la tegmenton. La muroj ŝirmas nin kontraŭ la malvarma vento; la tegmento ŝirmas nin kontraŭ la pluvo, neĝo kaj hajlo. Por ŝirmi la homojn kaj la konstruaĵon kontraŭ la fulmo, sur la supro de la tegmento estas starigita fulmoŝirmilo, konsistanta el vertikala fera stango kun platenumita pinto supre, kiu utilas por neŭtraliĝi la elektran potencon inter tero kaj nubo kaj eviti la falon de la fulmo. Tamen, se la fulmoŝirmilo ne kapablas eviti la falon de la elektra granda fajrero, la fulmo falus nepre sur la fulmoŝirmilon ne kaŭzante malbonon (aŭ kaŭzante nenian malbonon).

En la muroj ekzistas diversaj aperturoj (malfermaĵoj), nomataj respektive pordoj, fenestroj. Pordoj taŭgas kiel pasejo por la homoj, bestoj kaj objektoj. Fenestroj utilas por enlasi la (tag)lumon kaj por ebligi la aerumadon de la doma interno. Balkono estas plata elstaraĵo ĉirkaŭita de balustrado kaj komunikiĝanta per pordo kun la interno de la domo. Iuj domoj posedas verandojn, kio estas tegmentitaj kaj vitritaj balkonoj aŭ terasoj.

La tegmentojn oni faras el tegoloj, brikoj aŭ el ardezaj platoj. Ankaŭ ekzistas la tiel nomata artefarita ardezo konsistanta el miksaĵo de cemento kaj asbesto. Kelkajn simplajn dometojn aŭ barakojn oni tegmentas ankaŭ per zinko, gudrumita kaj sablumita kartono, aŭ per ŝindoj, t. e. (tio estas), lignaj tegoloj, aŭ eĉ per pajlo.

En la malvarmaj landoj la tegmentoj estas tre krutaj por faciligi la deglitaĵon kaj defluadon de akvo kaj neĝo.

Male, en la varmaj landoj, kie pluvo, neĝo kaj frosto ne okazas, la domoj estas tegmentitaj ĝenerale per terasoj, tio estas, ebenaj tegmentoj ĉirkaŭitaj de balustradoj.

La domo, kiun nia bildo prezentas, havas flanke aŭtomobilgardejon, tra kies malfermita pordo oni vidas aŭtomobilon. Sur ĝi troviĝas teraso kun masonita barilo. La fenestroj havas ĵaluziojn kaj post la balkonaj vitroj oni vidas kurtenojn. Antaŭ unu el la fenestroj sur la fenestrobreto staras florpoto kaj en la flanko pendas birdokaĝo. Sur

la angulo de la trotuaro staras stratlanterno. Sur la angulrandon de la domo, la mastro de la nutraĵvendejo fiksigas malgrandan montrorankon, kiu ŝajnas fermita. La markezo (tolsĵirmilo) aspektos bele kun siaj nigraj strioj; super ĝi troviĝas surskribo (aŭ anonco) kun la vorto "nutraĵoj" kaj cifero montranta la numeron de la domo.

El flanka balkono elstaras flago kaj super ĝi, apud la tegmento, estas pulihoko, kiu taŭgas por suprenlevi la meblojn en okazo de transloĝiĝo. (Kompreneble, ĝi same servas por mallevi ilin en la dirita okazo).

Sur la tegmento, krom la jam nomita fulmoŝirmilo, staras kamentubo ellasanta fumon, kiu pro sia blankeco ŝajnas vaporo; ankaŭ tie troviĝas ventoflago (aŭ ventmontrilo), kaj mansarda fenestro. Super la aŭtomobilejo estas desegnitaj tegolo, brikoj, balustrada, koloneto, kahelo, ŝlosilo, najlo kaj tubo.

La dekstra parto de la bildo montras tratanĉitan domon, por ke oni vidu ĝian internon. Sur ĝi ni vidas la ŝtuparon kaj la pordojn de ĝiaj loĝejoj dismetitaj en diversaj etaĝoj. En la subtegmento estas videblaj la traboj, kaj en la subtera kelo troviĝas diversaj objektoj, kiel kestoj, bareloj, k. a. (kaj aliaj).

Ni ne forgesu paroli pri aliaj objektoj, ekzemple, pri la defluilo. La aranĝo de la defluilo vidata sur la bildo (22) estas tre konvena, ĉar ĝi kondukas la pluvakvon de la tegmento rekte en la kloakon. La antikvaj defluiloj havis la malbonaĵon, ke ili ĵetis la akvon sur la straton kaj ofte malsekigis la neatentintajn preterpasantojn. La murŝirmiloj ambaŭflanke de la aŭtomobileja pordo estas du ŝtonoj evitantaj, ke frapoj de radoj difektu la randojn de la muro.

Antaŭ la pordo de la nutraĵvendejo estas du ŝtupoj, kiuj kondukas al blanka perono, ĉe kies ambaŭ flankoj troviĝas montrofenestroj, kaj en la fundo, la enirpordo.

INTERPAROLADO


Luanto: Mi vidis anoncon, ke tie ĉi estas luebla loĝejo. Ĉu vi povus diri al mi la prezon? — **Pordistino:** Ĝi kostas kvardek spemilojn ĉiumonate. — **L.:** La prezo konvenas al mi. Ĉu la loĝejo estas sufiĉe granda? — **P.:** Ĝi konsistas el tri belaj, bone aerumitaj dormoĉambroj, saloneto, necesejo, tualetejo, manĝoĉambro kaj kui-

rejo. Krom tio, ĝi havas galerion kun lavejo. **L.:** Ĉu vi havas la ŝlosilon? — **P.:** Ne, sed ĝin havas la administranto, kiu loĝas sur la interetaĝo de tiu ĉi domo. — **L.:** Ĉu vi scias, ĉu nun li estas hejme? — **P.:** Kredeble, ĉar mi hodiaŭ ne vidis lin eliri. (aŭ mi ne vidis, ke li eliras, aŭ mi ne vidis lin eliranta). — **L.:** Kiel estas nomata la administranto? — **P.:** S-ro Mateo.

L.: Bonan matenon, fraŭlino. Ĉu S-ro Mateo troviĝas en la domo? — **Servistino:** Jes, sinjoro. Kion vi deziras? — **L.:** Mi deziras vidi la lueblan loĝejon en ĉi tiu domo. — **S.:** Atendu momenton, kaj mi vokos S-ron Mateon.

Administranto.—Bonan tagon. Ĉu vi estas la sinjoro, kiu deziras lui la loĝejon? — **L.:** Jes, sinjoro. — **A.:** Ĉu vi scias la prezon? — **L.:** Jes, mi informiĝis per la pordistino. — **A.:** Tre plezure mi akompanos vin por vidi la loĝejon lueblan, kiu troviĝas sur la unua etaĝo, unua pordo.

L.: La ŝtuparo ne estas iaciga, ĉar la ŝtupoj estas malaltaj. — **A.:** Vi estas prava, kaj krom tio, rigardu, kiel ĝi estas pura kaj bone lumigita kaj aerumita per fenestroj. Ni jam alvenis al la unua etaĝo. Ni vidu la etaĝon, ĉu ĝi plaĉos al vi. Tie ĉi estas malgranda vestiblo kaj mallonga koridoro kondukanta al la manĝoĉambro. Apud la manĝoĉambro estas la kuirejo. — **L.:** Ĉu la domo havas abundecon da akvo? — **A.:** Jes, oni povas havi tiom, da akvo kiom oni volas, sed oni devas pagi ĝin aparte, kaj laŭ la kvanto montrita de la kalkulilo. — **L.:** Kiom kostas la akvo por kuba metro? — **A.:** Dudek kvar spesdekojn. — **L.:** Ĝi ŝajnas al mi iom kara. — **A.:** Tamen, ĝi estas la komuna prezo fiksita de la Kompanio por la tuta urbo. Oni povas ricevi la akvon pli malkare nur en la malnovaj domoj havantaj rezervujojn, sed tio ne estas rekomendinda, ĉar, kiel vi scias "akvo fluanta estas pli pura, ol akvo staranta senmove". Ni finu la viziton al la loĝejo. Jen estas pordo kondukanta al la saloneto. Jen estas unu dormoĉambro, jen alia, jen la tria. Tie vi povas vidi la galerion, el kiu oni ekvidas vastan korton kun ĝardenetoj de la najbaraj domoj. La apartamento estas, kiel vi vidas, tre aerumita. Ĉiu ĉambro havas sian fenestron al la ekstero. Eĉ en somero oni apenaŭ bezonas ventolilojn. **L.:** La loĝejo plaĉas al mi kaj mi estas preta ĝin lui. — **A.:** Bonvolu havigi al mi viajn referencojn kaj post du aŭ tri tagoj mi avizos vin por subskribi la kontrakton. **L.:** Jen estas miaj referencoj... Adiaŭ. Ĝis la revido! — **A.:** Fartu bone, sinjoro.



- | | | |
|---------------------------|------------------------------|----------------------------|
| 1. fundamento | 26. radoŝirmilo, ŝirmoŝtono | 49. balustro, balustradero |
| 2. subteraĵo | 27. kamentubo | 50. kahelo |
| 3. teretaĝo | 28. enirejo | 51. tubo |
| 4. interetaĝo | 29. vestiblo | 52. ŝlosilo |
| 5. ĉefetaĝo | 30. butiko | 53. najlo |
| 6. unua etaĝo | 31. surskribo, anonco | 54. tegmento |
| 7. subtegmento (mansardo) | 32. montroŝranko | 55. balustrado, barilo |
| 8. pordo (enirpordo) | 33. fulmoŝirmilo | 56. kesto |
| 9. lum(ig)ilo | 34. kameno | 57. trabo |
| 10. sojlo | Vidu Non. 28 en la bildo | |
| 11. ŝtupo | “La Familio. —La Ĉambro”. | |
| 12. ŝtuparo | 35. garaĝo, aŭtomobilejo | |
| 13. perono | 36. trotuaro | |
| 14. balkono | 37. markezo | |
| 15. barilo, barmuro | 38. pulihoko, rulbloka hoko | |
| 16. ĵaluzio | 39. flagostango | |
| 17. teraso | 40. florpoto | |
| 18. fenestro | 41. kaĝo | |
| 19. lanterno | 42. kornico | |
| 20. briko | 43. flago | |
| 21. tegolo | 44. (sub)tegmenta fenestro | |
| 22. defluilo | 45. ventoflago, ventmontrilo | |
| 23. soklo | 46. fumo | |
| 24. muro | 47. pordo | |
| 25. angulo, rando | 48. barelo | |

LA KUIREJO

La kuirejo estas ejo, kie oni kuiras kaj pretigas la manĝaĵojn. Kuiri la manĝaĵojn estas ilin moligi per la varmo. Por tion fari, oni tenas la kuirotan manĝaĵon dum iom da tempo (aŭ kelkan tempon), ĉu en bolanta akvo aŭ oleo, ĉu senpere super la fajro (t. e. en la aero, sen likva medio). Oni boligas la nutraĵon en akvo, fritas ĝin en oleo, stufas ĝin en suko konsistanta el miksaĵo de akvo, oleo, lardo, butero, spicoj, k. t. p., bakas ĝin en forno (bakujo) aŭ simple rostas ĝin super la fajro. Ĉe la okazo de la kuirado en fluidaĵo (likvaĵo), oni uzas diversajn kuirujojn, kiuj ricevas malsamajn nomojn, kiel ekzemple: kaldrono, bolpoto aŭ kuirvazo, por boligi, kaserolo, kiu taŭgas por stufi; aŭ pato, servanta por friti en varmega oleo. Por rosti oni uzas rostilon, konsistantan el vico (**aŭ serio**) da feraj stangetoj aŭ lamenoj, kapablaj subteni la nutraĵon malalte super la brulantaj karberoj, kiam la flamo jam estingiĝis (**aŭ** estas estingiĝinta).

Kuirilaro estas aro da kuiriloj. La kuiriloj estas faritaj el diversaj materialoj. Ekzistas kuirpotoj el argilo aŭ el porcelano; kaldronoj el kupro, kiujn oni stanumis interne, por eviti venenadon kaŭze de verdigro aŭ kupra acetato; kaldronoj el fero stanumita, emajlita aŭ porcelanumita por eviti la ruston aŭ feran oksidon; troviĝas ankaŭ kaldronoj el aluminio, metalo, kiu ne oksidiĝas tiel facile, tio estas, ĝi kontraŭstaras (**aŭ rezistas**) pli efike la agon de la aero, akvo, grasoj. Tamen, oni asertas, ke la plej higienaj vazoj por gardi la nutraĵojn dum kelka tempo estas la argilaj, la porcelanaj, kaj la vitraj.

(La) kaserolojn oni faras el la samaj materialoj, kiel kaldronojn aŭ potojn; nur ilia formo estas malsimila. Kaserolo, estante destinita por enteni negrandan kvanton da suko, ricevas formon pli malaltan, ol kaldrono. (**aŭ** Kaserolon, estantan difinita por enhavi proporcio negrandan kvanton da suko, oni faras ĝenerale pli malalta, ol kaldronon, kiu estas difinita por enteni grandan kvanton da bolanta akvo.) Patoj estas ankaŭ malaltaj aŭ plataj (platigitaj, platecaj), eĉ malpli kavaj, ol (la) kaseroloj. (**Aŭ** ilia formo estas pli plata, ol tiu de la kaseroloj).


Ekzistas fornoj nomataj “ekonomiaj kuirejoj”, kiel tiu, kiun mon-

tras nia bildo, faritaj el fera plataĵo. Tiuj fornoj konservas longe la varm(ec)on, funkcias je terkarbo, koakso aŭ (brul) ligno, kaj posedas funkondukilon, por ke la fumo aŭ gasoj ne ĝenu la homojn (aŭ personojn) en la loĝejo; plie, ili posedas bakujon aŭ bakforon; kelkaj el ili havas ankaŭ cirkulan rezervujon por varma akvo, nomatan (aŭ kiu estas nomata, aŭ kiun oni nomas) "termosifono".

DIALOGO

Ma(ri)njo, iru al la (vendo)halo aĉeti kelkajn nutraĵojn por la tagmanĝo. — Kion vi volas, ke mi aĉetu, Klaro? — (Alportu) rizon, makaroniojn kaj vermicelojn por la supo; viandon, terpomojn, brasikon, celerion kaj karoton por la buljono. Ankaŭ alportu oleon kaj lardon. Kaj por la antaŭmanĝaĵoj akiru olivojn, buteron, kolbason, ŝinkon, laktukon, endivion kaj rafanojn. Aĉetu iom da ŝafaj kotletoj, funton da bovida viando, duonkilogramon da gado, du dekduojn da mituloj kaj du funtojn da freŝa fiŝo.

Ĉar ni ne plu havas salon ne forgesu aĉeti iom da ĝi. (aŭ aĉeti ĝin). — Mi penos forgesi nenion, sed tial ke vi komisias al mi multajn aferojn, kaj mi ne havas grandan memoron, mi prenos paperon kaj kraĵonon kaj faros liston por eviti forgeson. La listo jam estas farita, kaj mi pensas, ke mi notis ĉion.—Jen, tie vi havas la korbon. Dume mi ekbruligos la fajron (aŭ hejtos la fornon), kaj mi metos sur ĝin kaldronon da akvo por ke ĝi varmiĝu. Mi esperas, ke kiam vi revenos ĝi jam estos bolanta. — Adiaŭ, Klaro, — Ĝis la revido, Manjo. (aŭ Marinjo)



- | | | |
|------------------------|-------------------------------|-------------------|
| 1. kuiristino | 26. gladilo | 51. breto |
| 2. fajrujo, forno | 27. gladotabulo | 52. laktujo |
| 3. bakujo, forno | 28. kafujo | 53. anso |
| 4. pato | 29. ĉokoladujo | 54. fumkloŝo |
| 5. tenilo | 30. kulerego | 55. fumkondukilo |
| 6. kaserolo | 31. lavopelvo | 56. fajrventumilo |
| 7. holpoto | 32. korktirilo | 57. tubo |
| 8. kaldrono | 33. kribrilo | 58. kurteno |
| 9. potkovrilo | 34. rostilo | 59. telertuko |
| 10. poteto | 35. telero | 60. radeto |
| 11. tranĉilo | 36. plado | |
| 12. haktranĉilo | 37. pistujo | |
| 13. hakbloko | 38. pistilo | |
| 14. ŝtupetaro | 39. kruĉo | |
| 15. seĝo | 40. balailo | |
| 16. henketo | 41. korbo | |
| 17. akvujo | 42. funclo | |
| 18. krano | 43. manviŝilo | |
| 19. telertenilo | 44. ĉerpilo | |
| 20. rubujo, deĵetaĵujo | 45. ŝaŭmilo, fritturnilo | |
| 21. karbujo | 46. lampo | |
| 22. ŝovelilo | 47. lumŝirmilo | |
| 23. fajroprenilo | 48. kontaktigilo, interuptoro | |
| 24. ŝranko | 49. izolilo | |
| 25. tablo | 50. botelo | |

LA KOLOROJ

Ruĝa, kiel sango

Flava, kiel citrono

Verda, kiel herbo (freŝa), freŝa folio.

Blua, kiel sennuba ĉielo (tio estas, la aero)

Nigra, kiel karbo

Blanka, kiel neĝo, lakto

Griza, kiel cindro (miksaĵo el nigra kaj blanka)

Bruna, kiel kaŝtano, migdalo (la interna, ligna ŝelo). (Nia haŭto bruniĝas pro la suna lumo kaj la aero).

Blonda (pri la haroj), orflava.

Aliaj koloroj alprenas la nomon de la koncerna ekzemplo: **oranĝa**, **roza**, **viola**, **kaŝtana**. Ekzistas metalbrilaj koloroj, kiel **ora**, **arĝenta**, **kupra**. (Oni ofte diras arĝentkolora, violkolora, rozkolora, kaŝtankolora, k. t. p.)

Ĉiuj koloroj povas esti **helaj** aŭ **malhelaj**, tial oni povas diri, ke io estas **hele** blua, **malhele** verda, k. t. p.

Verda estas la koloro de la kvinpinta **esperanta stelo** kaj unu el la koloroj de la **esperantista standardo**, kaj ĝi simbolas la **esperon**.

Blanka estas unu el la koloroj de la **esperantista standardo**, kaj ĝi simbolas la **pacon**.

LA FORTO DE LA KUTIMO

Jen estas **blanka** drapo; jen estas **flava** drapo. Kiu el ili estas pli bela? "Tio, laŭ la opinio aŭ ŝato (aŭ gusto)", vi respondos.

Jen vi vidas **blankan** (arĝentan) ringon, kaj jen ni vidas **flavan** (oran) ringon. Kiu el ili estas pli bela? Certe ĉiu respondos "la **flava**", ĉar ĉiu scias, ke oro estas pli valora (aŭ multekosta), ol arĝento.

Tio estas por montri, ke nia gusto ofte estas influata aŭ direktata de la kutimo. (Aŭ Per la montrita ekzemplo, vi vidas kiel ofte nian opinion, guston aŭ ŝaton decidigas la kutimo.)

DICCIONARIO ESPERANTO-ESPAÑOL (parte 1) y ESPAÑOL-ESPERANTO (abreviado) (parte 2)

Contiene todas las raíces del Diccionario Oficial (Academia Esperantista, 1922 y Adiciones Oficiales 4.^a, 5.^a y 6.^a); las precedidas de un asterisco (*) figuran en la obra «Fundamento de Esperanto» base intangible que todo esperantista debe conocer.

El apóstrofo detrás de las raíces indica que hay que añadirles la terminación gramatical correspondiente. Las sin apóstrofo final pueden usarse sin terminación. Las palabras entre paréntesis, aunque usadas por algunos esperantistas, no son oficiales.

A fin de hacer resaltar la gran semejanza entre ambos idiomas, se ha omitido en la parte 1 la traducción española de las palabras casi iguales; a éstas se les ha añadido la terminación gramatical esperanta con que se emplean más a menudo.

El guión indica repetición de palabra o parte.

Modo de usar este Diccionario

